

## Informilo 2: 43a Konferenco de ILEI:

# Neforgesebla semajno atendas vin en Kubo

Kiu memoras la juvelan konferencon de Hanabaniĵa en 1990 certe strebos partopreni la sekvan ILEI-konferencon en 2010! Kiu ne memoras, partoprenu ĉiuokaze por ke ni kune konstruu tian estontecon kian ni sopiras!

### Konferenca urbo:

**Matanzas**

### Konferencaj datoj:

**Julio 11 (dimanĉo)**

**ĝis julio 17 (sabato), 2010**



La konferencejo estos la hotelo Canimao, kiu provizos loĝigon kaj manĝojn por la konferencanoj, kaj disponigos konvenajn salonojn por praktike ĉiuj eroj de la programo. Eventuala simpozio plej verŝajne okazos en universitato en promen-distanco de la hotelo.

Fotoj de la konferencejo estas afishitaj en nia retejo ([www.ilei.info](http://www.ilei.info)). La konferenca oferto inkluzivos transporton de Havano (de la flughaveno aŭ la urbo), kiun la hotelo provizos per minibusoj aŭ similaj veturiloj, sed konferencanoj devas klare antaŭanonci siajn flugojn kaj alven-horojn, aŭ siajn akcepto-dezirojn. La reira transporto al la UK post la konferenco estos laŭplane per komuna buso.

Ni nun kompilas proponojn por konferenca temo, konsultante kun UEA kaj konsiderante la proklamitajn 'Jarojn' por 2010 ĉe Unuighintaj Nacioj kaj Unesko.

Kiel dirite, la programo havos tri esencajn elementojn, el kiu ĉefrolas la faka:

### Faka programo:

Tio dependos grandparte de la ĉeestantaj fakuloj, kaj antaŭvideble havos pli modestan gamon kaj bunton ol en lastaj jaroj. Tamen, ni strebos al kiel eble plej alta kvalito, kun limigo de la kvanto da paralelaj programeroj. Ĉiutage ĉiuj konferencanoj havos eblon kunveni por unu komuna faka aranĝo – panel-diskuto, forumo, grup-laborado aŭ similo.

### Labora programo:

La komitato kunsidos komence de la konferenco, aŭdos raportojn kaj starigos publikajn labor-grupojn. La komisiono pri universitata/scienca agado kaj la lerneja komisiono certe okazigos labor-rondojn, eventuale ankaŭ aliaj komisionoj (terminologio, ekzamenoj...) faros similon. Tie eblos aŭdi pri la faritaj laboroj, kurantaj projektoj kaj estontaj planoj kaj kontribui al mini-projekto elektita por kuna plenumo dum la konferencaj tagoj. Ĉiutage unufoje okazos paralelaj kunsidoj, tiel ke ĉiu povas elekti kampon pri kiu kontribui kaj kunlabori. Eventuale ni oferos unu fakan prezentaĵon paralele kun tiuj labor-grupoj, por tiuj, kiuj nepre volas nur fakumi! Ni starigos (almenaŭ) unu dum-konferencan komisionon – pri komunikado – kun la tasko pretigi gazetarajn komunikojn pri la konferenco kaj por liveri poste tekstojn kaj fotojn al IPR, revuo *Esperanto* kaj aliaj revuoj, radio-stacioj kaj hejmpaĝoj. Fine de la semajno la komitato kunsidos denove por aŭdi rezultojn de la laborgrupoj kaj plani la plurajn laborojn.

### **Distra programo:**

Ni inkluzivos en la konferenca oferto ekskursojn, ekzemple unu tuttagan al la plaĝo Varadero, kaj duontagan pli proksime. La hotelo kompreneble pretas rekomendi aliajn eblojn por unuopaj konferencanoj. Ni decidis koncentri la komunan ekskurs-oferton por ke la faka kaj labora programo havu konvene grandan publikon. La vesperaj programoj, kiel chiam, ofertos abundajn eblojn por distrado.

### **Pliaj programeroj:**

Ĉi tiuj estas ankoraŭ planataj, sed ni esperas oferti ion pri instruista trejnado, se ni havos dezirantojn, precipe inter kubaj aŭ latinamerikaj kolegoj. Ekzamen-sesio simile aranĝeblas, se anoncos sin kandidatoj. Pri ebloj por simpozio, oni esploras.

Ni nun finas la interkonsentojn pri la kotizoj, kaj anoncos tiujn tre baldaŭ, kune kun la pretigo de aliĝilo. Tio aperos en la retejo, kaj en IPR 2009/4.

### **Loka Kongresa Komitato:**

Nia estrarano Julián Hernandez Angulo estos la prezidanto de LKK de la Konferenco, Marta Alonso Gutiérrez, la landa sekciestro, estos la vicprezidanto kaj Pedro Fernández, Gonzálo Collantes kaj Yoandra Rodríguez estos la aliaj membroj. En kunsido de la LKK de la 95a UK, chiu konsentis ke Julián prezidos la LKK de la tri internaciaj eventoj: UK, IJK kaj la ILEI-konferenco, por certigi kunordigon de la tri eventoj.

### **Pri la lando**

Situanta meze de la Kariba Maro, la Respubliko de Kubo estas arkipelago formata de la insulo granda, Kubo, plus alia insulo nomata Isla de la Juventud (Insulo de Junularo) kaj krome 4 195 insuloj kaj insuletoj kies totala surfaco estas je 110 922 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas longa kaj mallarĝa. La plej proksimaj landoj estas Haitio, Usono, Jamajko kaj Meksiko. La vetero en Kubo ĉiam estas kvazaŭ eterna somero pro ĝia klimato tropika, kies averaĝa temperaturo jare estas je 25 gradoj celsusoj.



La insula loĝantaro superas 11 milionojn kun ĉefurbo Havano, en la okcidenta regiono. La oficiala kaj sola lingvo parolata estas la hispana.

Spektu 9-minutan filmon pri Kubo kun Esperanta komentario en la UEA-parto de Ipernity.  
<http://www.ipernity.com/doc/97850/5988676>

---

### **Informoj jam donitaj en Informilo 1 (Aug 18,2009)**

#### **La urbo Matanzas**

Matanzas, [matansas] ofte nomata Ateno de Kubo pro la frua kaj altnivela kultura kaj klera etoso, ankaŭ famas pro la plurnombraj pontoj, ĝia arkitekturo kaj muziko. Ĝi estas urbo konstruita che la maro, tuj malantaŭ granda haveno situanta je 42 km okcidente de Varadero kaj je 120 km oriente de Havano.

Iama chefurbo de sukero kaj arto, la urbo Matanzas posedas vizitindajn lokojn kiel la teatro Sauto [sauto], la katedralo Sankta Karlo, la Historia Muzeo kaj la parko Libertad, inter aliaj belajhoj. Ĝi estas ideala loko por ghui la famajn rumbojn kaj aliajn tradiciajn muzikajn ĝenrojn.

## Hotelo Islazul Canimao

Sur deklivo rondiranta la riveron Canimar [kanimar], navigebla tra kelkaj kilometroj, oni trovas la hotelon Canimao [kanimao], ideala por ĝui kompletan feriadon meze de trankvila kaj natura medio.

Ĝia proksimeco al la bela urbo Matanzas, en la samnoma provinco, ebligas al vizitantoj ekskursi al diversaj kulture kaj historie tre interesaj lokoj, miri pri ties arkitekturo, ĝui la belan havenon kaj promeni sur ĝiaj viglaj stratoj.

Oni povas ankaŭ viziti la faman banlokon Varadero kies natura beleco igas ĝin la plej populara en Kubo. Aliaj turismejoj en la proksimeco estas La grotoj de Bellamar kaj la kabaredo Tropicana Varadero, kiu proponas neforgeseblan vesperon per unika tipe kuba spektaklo.

La hotelo Canimao disponas pri 158 komfortaj ĉambroj klimatizitaj, ĉiuj kun privata necesejo kaj duŝo, radio kaj satelita TV, kun alekstera videbleco; restoracio, kafeterio, trinkejo, nokta klubo, naĝejo, ludejo, masaĝ-ĉambro, reta servo, vendejo, monŝanghejo, sekureca kaso centrala, kunvenejo kaj parkejo.



## La konferenco

La hotelo Canimao ludos centran rolon en la konferenco, tiel ke ĉio estos konvene lokita. ILEI ofertas pakadon, kiu inkluzivos du manĝojn tage, la loĝigon, la programon, alvenon kaj foriron plus iuj ekskursoj. La programo havos tri esencajn fadenojn: fakan, laboran kaj distran. Ni planas la programon tiel, ke ĉiuj tri fadenoj povos en ekvilibro disvolvighi. ILEI prenis kontakton kun UEA por ke ilia flug-oferto inkluzivu konvenajn flugojn por konferencantoj kaj kun la loka organiza teamo por ke junaj instruistoj el Kubo kaj najbaraj landoj havu eblon partopreni.

Unika semajno atendas vin!